## Novjara mesaĝo de la AIS-prezidanto

A. Wandel, Decembro 2025

http://www.ais-sanmarino.org

*Ĉi-somere Akademio Insternacia de la Sciencoj (AIS) plenumis centran rolon en tri grandaj internaciaj E-kunvenoj: komence de julio okazis la 41-a Scienca Universitata Sesio (SUS) kadre de la Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) en Litovio. Komence de aŭgusto okazis la 78-a IKU-AIS sesio en la Universala Kongreso en Ceĥio, kaj fine de aŭgusto okazis la 42-a SUS kadre de la Itala Kongreso, kies ĉeftemo estis "Esperanto: bona lingvo por scienco". En 2026 okazos Internacia Vintra Universitato en la NR kaj Luminesk, 43-a SUS dum la Germana Kongreso en Ĉeĥio kaj IKU-AIS dum la UK en Graz.*

### Persona perspektivo pri IKU kaj AIS

La jaro 2025 estis la cent-jara jubileo de IKU, kies unua sesio (kun la nomo Internacia Somera Universitato) okazis en Ĝenevo, 1925. La ĉi-jara IKU-sesio markas ankaŭ mian 30-jaran prizorgadon de IKU kaj la sciencan agadon de UEA, el ili preskaŭ 20 kiel IKU-sektetario. En 1995, kiel nova estrarano de UEA pri Scienca kaj Faka Agado, mi iniciatis la kunlaboron inter IKU kaj AIS, ekde kiam regule okazas la komunaj IKU-AIS-sesioj. Aldone, ĉi-jare IKU festas la dek-jaran datrevenon de la Scienca Kafejo, kiun mi enkondukis en 2015 dum la UK en Lillo.

Antaŭ ses jaroj mi refoje ekservis en la estraro de UEA, kaj plu evoluigis IKU, la sciencan programon dum la Universalaj Kongresoj kaj en la 5 unuaj Virtualaj Kongresoj. Mi ankaŭ progresigis la sciencan eldonadon en Esperanto, aparte la IKU-libron. Ĉar en Burno mi ne estis reelektita por la estraro de UEA, estas nun la tasko la novaj personoj daŭrigi mian laboron pri IKU kaj scienca agado en UEA. Bedaŭrinde dum la 6-a Virtuala Kongreso en decembro 2025 oni ne daŭrigis mian projekton reokazigi la IKU-prelegojn de la UK, kaj sekve ĝia scienca programo estis magra.





AIS prezidanto Wandel, IKU-rektoro Barandovska-Frank kaj AIS-trezoristo Wickstrom ĉe la IKU-AIS budo en la Movada Foiro dum la UK en Burno, kie okazis la AIS ĝenerala Asembleo de 2025.

La liberiĝo de la respondecoj en UEA ebligos pli intensan konstruon de AIS. Plurajn paŝojn en tiun direkton mi jam komencis, kiel renovigo de la AIS-retejo (kunlabore kun Franz Kruze), la Premioj Pirlot kaj Power, kaj kunordigo de SUS-41 kaj SUS-42. Estonta projekto estas traduko en E-on de mia ampleksa libro "Life in Space" (https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-031-64639-3), pri kiu mi prelegis en Akademia konferenco (https://www.youtube.com/watch?v=6Mou57RgfTo).

La Ĝenerala Asembleo de AIS okazis dum la UK en Burno, kaj aliĝis pluraj novaj membroj. La proksimaj eventoj de AIS estas la Internacia Vintra Universitato, okazonta dum la Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden kaj Luminesk en Bingen. La venonta SUS-43 estas planata kadre de la Germana E-Kongreso en Ĉeĥio, en majo 2026, sekvota de la 79-a IKU-AIS sesio dum la UK en Graz.

**Premioj Pirlot kaj Charles Power por sciencaj libroj kaj prelegoj**

Dum la UK estis anoncitaj la rezultoj de konkursoj en tri sciencaj branĉoj (Gazetara Komuniko: https://uea.org/aktuale/komunikoj/2025/Rezultoj-de-la-sciencaj-konkursoj-Pirlot-kaj-Power-kaj-la-scienca-programo-dum-la-110-a-UK ), kiujn oni povas komune nomi “Sciencaj Konkursoj”, simile al la Belartaj Konkursoj. Dum la Scienca Forumo okazinta kadre de la UK estis disdonitaj la Premio Pirlot (por la plej bonaj sciencaj libroj) kaj la nova Premio Charles Power (por la plej bonaj sciencaj prelegoj). La konkurso por Premio Pirlot estis organizita de AIS inter 1994-2001 kaj post longa interrompo denove ekde 2017. En 2025 AIS ekorganizis la novan Premion Power. Ambaŭ premioj estis unuafoje disdonitaj sub la aŭspicio de UEA. La premion Power ebligis malavara subteno de ĝia mecenato, Daniela Power, kaj admininstris ĝin la trezoristo de AIS, B.A. Wickstrom. Entute estis aljuĝitaj 3 premioj Pirlot (gajnis *Astronomio kaj Astrofiziko por Ĉiuj*, *IKU-libro 2025* kaj *La Rivoluoj de la Cielaj Korpoj*), kaj 6 premioj Power (IKU: Wandel, Bebenina, Koutny, kaj Scienca Kafejo: Jackson, Bormann, Fernandez).


AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ
Internationale Akademie der Wissenschaften – Académie Internationale des Sciences – International Academy of Sciences
Sub aŭspicio de Universala Esperanto Asocio

ATESTO

Judith Jackson

Ricevis la unuan premion
**Charles Power**

Je la sumo de 300 Eŭro, konforme al komuniko uea.org/gk/1237a1 en la konkurso pri la plej bona mallonga scienca prelego de la jaro

por la prelego

**Gregor Johann Mendel**

| | |
|---|---|
| **La okazinta kadre de**<br>Den institutionellen Rahmen des Kurses bildete<br>The course was held within the framework of<br>Le course a eu lieu dans le cadre de | **Internacia Kongresa Universitato**<br>**Sesio 78 – Scienca Kafejo**<br>*(studadsesio aŭ universitatnivela institucio)* |

En la dato/ in the date/ au **31/7/2025**

Membroj de la jurio: Vera Barandovska-Frank, BngtArne Wicksrom, Carlos Spinola

**Amri Wandel** Prezidanto de AIS — **1.8.2025** Brno, Ĉehio


**IKU-prelegoj kaj AIS-atestoj**

En la IKU-AIS inaŭguro, okazinta post la malfermo de la UK en Burno, prezentis la 78-an sesion de la Internacia Kongresa Universitato ĝia rektoro, AIS prof. Vera Barandovska-Frank. A. Wandel raportis pri la scienca programo dum la fermo de la UK. Entute okazis 19 prelegoj: ok IKU-prelegoj, tri daŭrigaj prelegoj kadre de la komuna IKU-AIS sesio, kaj ok prelegoj de la Scienca Kafejo (SK). En la tri IKU-AIS kursoj partoprenis po 100-145 kongresanoj kaj en la cetereaj IKU- kasj SK-prelegoj po 60-100. La temoj ege variis: Matematiko, Lingvistiko, Spacteknologio, Historio, Arkitekturo, Literaturo, Medicino, Lingvopolitiko, Kemio, Arkivistiko, Fiziko, Daŭripovo. Dum la Scienca Forumo estis publike disdonitaj la atestoj por du IKU-AIS-kursoj, en kiuj okazis ekzamenoj: tri atestoj en la kurso *La ambigueco de Nombroinformo* de E. Bebenina, kaj 31 atestoj en la kurso *La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado* de A. Wandel. Detalaj informoj pri la scienca programo aperis en la Kongresa Libro kaj en la Kuriero https://uk.esperanto.net/2025/kuriero (n-roj 6 kaj 7).


Disdono de AIS-atestoj dum la Scienca Forumo, antaŭ la AIS-asembleo en la UK en Burno.

**Rekorde ampleksa IKU-SUS libro kaj du IKU-AIS broŝuroj**

La abunda scienca programo spronis rekorde ampleksan IKU-libron de 330 paĝoj, kiu enhavas ankaŭ kvar tekstojn de la 41-a Scienca Universitata Sesio de AIS okazinta komence de julio dum la Baltiaj E-tagoj en Kaŭno. La AIS-kursoj de A. Wandel aperis ankaŭ en du apartaj koloraj broŝuroj, "Spacvojaĝado kaj Esplorado" (32 p) kaj "Astronomio kaj Astrofiziko por Ĉiuj" (54 p), haveblaj ĉe UEA kaj AIS. La suba diagramo montras la evoluon de la IKU-libro laŭ la nombro de paĝoj, ekde la modesta broŝuro kunmetita de Lee C. Yeong kaj A. Wandel en 1997 ĝis la plej ampleksa libro de 2025. La IKU-libro aperis unue broŝurforme kaj ekde 2017 libroforme. Diĝitaj versioj de la IKU-libro estas haveblaj en la IKU-retejo https://uea.org/kongresoj/universitato ekde 2005, kaj por la jaroj 1998 kaj 2002.




**AIS en la Faka Forumo, Aŭkcio kaj Stelobservado**



Dum la UK okazis la Faka Forumo, kunordigita de A. Wandel, kiu parolis pri AIS kaj ĝis renovigita retejo kiu laŭplane servos ankaŭ por la revigligo de ISAE. En la Aŭkcio estis venditaj pluraj objektoj rilataj al AIS kaj sciencaj verkoj. Kiel ĉiam estis aŭkciita la IKU-libro kun la subskriboj de ĉiuj ĉeestantaj prelegintoj. Aldone, estis aŭkciitaj la gajnintaj libroj de la Premio Pirlot, kaj la atestiloj de la Premio Power. Fine oni aŭkciis la historian helblu-blankan kravaton de AIS.

Nekutima elemento de la scienca programo de la UK estis la ekskurso E8, okazinta merkrede vespere, en la nova planetario de Burno. La 140 partoprenintoj ĝuis specialan 40-minutan 3-D-programon *La Universo per ĉiuj sencoj*, kun E-tradukado zorge preparita de la Loka Kongresa Komitato, kaj prelegon pri la historio de astronomio fare de A. Wandel, kiu sekve gvidis virtualan viziton de la nokta ĉielo helpe de la plej novaj rimedoj de la planetario.



Klarigo pri spacteleskopo Webb en la vizito al la planetario, dum la UK en Burno (foto: John Huang)

**La 41-a Scienca Universitata Sesio dum BET**

Jam la trian fojon la Scienca Universitata Sesio (SUS) de AIS okazis kadre de Baltiaj E-Tagoj (BET) ĉi-jare okazinta en Kaŭno, Litovio. Raporto videblas en "Kunfluo", la BET-kuriero http://www.esperanto.lt/board/data/bet59/kunfluo_nro7.pdf. Estis ofertitaj du kursoj: pri kulturo (Ilona Koutny) kaj astrofiziko (Amri Wandel), kaj du prelegoj: pri astronomio (Carlos Spinola) kaj vitaminoj (Ite Tytgat). Fine de la kurso pri astrofiziko okazis kiel kutime ekzameneto kiun partoprenis 25 personoj. La partoprenintoj ricevis AIS-atestojn dum la BET-fermo. Aldone okazis dum BET pluraj prelegoj de la Somera Universitato kaj kurso de Mark Fettes *Lingvo kaj mondo,* elŝutebla ĉe https://www.researchgate.net/publication/ 393554289_Lingvo_kaj_mondo. Por la BET estis preparitaj speciala eldono de la IKU-libro, kaj nova libro *Astronomio kaj Astrofiziko por ĉiuj*, kunverkita de A. Wandel kaj C. Spinola, kiu enhavas detalajn tekstojn de la SUS-prelegoj de ambaŭ aŭtoroj kaj kolorajn ilustraĵojn.




**AIS kaj SUS-42 dum la Itala Kongreso**

Dum la Itala E-Kongreso en Salsomaggiore Terme okazis fine de aŭgusto la 42-a sesio de SUS, kunlige kun la kongresa temo "Esperanto: bona lingvo por Scienco" kiun reĝisoris A. Wandel. Kadre de SUS okazis en la programo ( https://kongreso.esperanto.it/91/programo/ ) du kursoj: *Astronomio por scivolemuloj* (A. Wandel), kaj *Ĵurnalismo kaj Artefarita Intelekto* (Massimo Ripani), kaj ses sciencaj prelegoj: *Ĉu la scienco estas vere internacia? Ĉu ni bezonas internacian lingvon por internacia scienco?* (Carlo Nicola Colacino), *Lingva justeco kaj scienca komunikado* (Michele Gazzola), *Operacia Esploro: Optimumi en Mondo de Kompleksec*o (Luca Coslovich), Malagasujo, interesa lando (Ulrich Matthias kaj Miora Raveloharison; rete), *La t.n. politikaj arĥitekturoj* (Ana Alebić Juretić), kaj *Debato pri prestiĝo de Esperanto* (Aleksander Zdechlik). Fine okazis AIS-ekzamenoj, en kiuj partoprenis rekorda nombro de personoj: en la du kursoj de Wandel, Astronomio por Scivolemuloj kaj Spacvojaĝado ekzameniĝis 15 kaj 17 el la c. 40 aŭskultantoj, respektive, kaj en la kurso de Ripani, Ĵurnalismo kaj AI, ekzameniĝis 10 el la ĉ. 35 aŭskultantoj. Ĉiuj ricevis siajn AIS-atestojn dum la fermo de la Itala Kongreso, kiu okazis post la memorhoro pri Renato Corsetti.

**Esperanto kiel lingvo de scienco**

Tiu grava temo estis detale traktita kiel la kongresa temo de la Itala Kongreso. Okazis intensaj prelegoj kaj diskutoj (dum sume ĉ. 15 horoj). Dum la kongresa inaŭguro (https://www.youtube.com/watch?v=QkAHlEhlpv4 ) la temo estis koncize priskribita en la parolo de la reĝisoro, A. Wandel (vidu ĉi-sube). Plu prelegis rilate al la temo Carlo Nicola Colacino, kiu traktis la demandojn *Ĉu la scienco estas vere internacia?* kaj *Ĉu ni bezonas internacian lingvon por internacia scienco?* Sekvis prezentado kaj diskutado far Alessandra Madella pri Komunikila konverĝo kaj niĉ-komunikiloj en Esperanta ĵurnalismo, kaj la ĵurnalisto Massimo Ripani diskutis la etikajn demanfojn kaj la estontecon de Artefarita Intelekto en ĵurnalismo. El pli scienca vidpunkto (Operacia Esploro) traktis la saman temon Luca Coslovich.

Amri Wandel prezentis la historion de scienco en la Esperanto-movado ekde la komencaj jaroj de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) kaj ĝia Scienca Revuo komence de la dudeka jarcento, tra la evoluo de Internacia Somera (poste Kongresa) Universitato, la fondiĝo de AIS en la okdekaj ĝis la nuna stato de scienca agado kadre de UEA kaj IKU, la nova impeto ĉe AIS en la lasta jardeko, kaj scienca eldonado en Esperanto kaj la provoj reaktivigi ISAE. Li ankaŭ diskutigis demandojn kiel "Ĉu Esperanto estas efika lingvo por scienca kounikado? Ĉu pli justa lingvo por internaciaj sciencaj konferencoj? Carlo Minnaja provizis historian pespektivon prezentante la fondiĝon kaj agadon de AIS en la komencaj jaroj.



Kun Carlo Minnaja dum la Itala Kongreso

**Parolo de A.Wandel dum la inaŭguro de la Itala Kongreso**

La ĉeftemo de la ĉi-jara Itala Kongreso, " bona lingvo por Scienco" koincidas kun pluraj jubileoj de scienca agado en essperantujo. Antaŭ 120 jaroj fondiĝis ISAE, kaj ĝia Scienca Revuo. Antaŭ 100 jaroj unuafoje okazis dum la UK en Ĝenevo la unua sesio de la Internacia Somera Universitato (ekde 1980 IKU), la plej malnova kaj renoma daŭre aktiva scienca institucio en Esperantujo. Antaŭ 40 jaroj, ne for de ĉi tie, en San Marino, formale fondiĝis AIS, kaj okazis ĝiaunua Scienca Universitata Sesio (SUS). Dek jarojn poste, en 1995, kiel nova estrarano de UEA mi iniciatis la komunajn sesiojn inter IKU kaj AIS. Ĉi jare, antaŭ unu monato, en Burno okazis do la 100a jibileo de IKU kaj la 30a jubileo de la kunlaboro inter UEA kaj AIS.

Dum la ĉi-jara Itala Kongreso okazas la 42-a SUS, sep jarojn post la antaŭa fojo, kiam la Itala Kongreso gastigis SUS, en San Marino. Kiam la organizantoj invitis min reĝisori la kongresan temon, mi pensis ke tio estos bona okazo pritrakti ankaŭ la historian evoluon de la scienca agado en Esperanto, kiu forte rilatas al la lingva aspekto.

Kiam Zamenhof kreis Esperanton, mankis en ĝi multaj sciencaj terminoj, eĉ konsiderante la sciencon fine de la 19a jarcento. Komence de la 20a jarcento rapide aldoniĝis al la scienco novaj terminoj, sekve de revoluciaj malkovroj kiel la relativeca teorio de Einstein en fiziko kaj en aliaj sciencaj branĉoj kiel biologio, kemio, astronomio, psikologio... Estante fleksebla kaj adaptema lingvo, tiu manko en Esperanto iom post iom povis esti kompencita.

Dum la dudeka jarcento la mondo vidis la ŝanĝiĝon de la ĉefa lingvo de scienco, de la germana al la angla. Esperanto, kiu restis marĝena en tiu proczo, tamen sukcesis ne postresti en la kresko de scienca aktiveco, dank al institucioj kiel ISAE kaj ĝia Scienca revuo, sekve ISU kaj IKU, en la okdekaj AIS, sekve konferencoj kiel KAEST kaj retejoj kiel STEB.

Dum la intensa seminario okazonta ĉi-kongrese ĉiun matenon ni provos trakti tiun fascinan fenomenon el plej diversaj vidpunktoj, de la historiaj aspektoj ĝis la estontaj defioj kaj potencialo, kiel la uzo de AI kaj plifortigo de la scienca eldonado en Esperanto.